2. Mitgliedsbeiträge werden per SEPA-Mandat eingezogen. Nur in Ausnahmefällen ist die Überweisung möglich.
3. Mitgliedsbeiträge werden jährlich eingezogen. Nur in Ausnahmefällen ist der halbjährliche Einzug möglich.
4. Als Abbuchungsmonat kann durch das Mitglied der Januar, Februar oder März gewählt werden.
5. Die Rückzahlung bereits bezahlter Beiträge ist ausgeschlossen.
6. Eine Mahngebühr in Höhe von 10 % des Beitragssatzes kann erhoben werden.

§ 4 Mitgliedschaftskategorien

Folgende Mitgliedschaftskategorien mit ihren Beitragssätzen pro Jahr sind festgelegt:

Kategorie	Bemerkung	Beitragssatz
DEB-O	mit Einkommen	84 €
DEB-OE	ohne Einkommen	42 €
DEB-OP	Mäzen	168 €
DEB-OF	Paare / Familien / Haushalte, Zahlender	126 €
DEB-FO	Paare / Familien / Haushalte, Nicht-Zahlender	0 €
DEB-OH	Ehrenmitglied	0 €
DEB-SEA	Fördermitglied mit ‚Esperanto aktuell‘	21 €

§ 11 Inkrafttreten

Diese Beitragsordnung wurde von der Bundesversammlung nach Beratung am 9.6.2019 beschlossen und tritt mit Wirkung zum 9.6.2019 in Kraft.

Neumünster, 9.6.2019

Ulrich Brandenburg
Vorsitzender des D.E.B.

Andreas Emmerich
Stellv. Vorsitzender des D.E.B.

Medienecho

Ich bedanke mich herzlich für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam-Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die mir aber selber vorliegen, wird hingewiesen. Diese sende ich Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zu. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" – Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

14. November 2018

Herzberg am Harz

Esperanto-Verbandsrat tagte im Harz

Schon seit über zehn Jahren tagt der Vorstand des Deutschen Esperanto-Bundes mit Repräsentanten der Landesverbände jeweils im Herbst in Herzberg. Der Vorsitzende Ulrich Brandenburg aus Berlin freute sich auf die hiesigen Begegnungen; denn in dieser Südharzstadt fühle er sich daheim.

<http://www.herzberg.de/magazin/artikel.php?artikel=4514&type=2&menuid=377&topmenu=7>

12. November 2018

Radio Dreyeckland

Esperanto-Magazin

<https://player.fm/series/radio-dreyeckland-180765/esperanto-magazin039-montag-12112018>

12. November 2018

Dresdner Neueste Nachrichten

Das Esperanto-Zentrum „Marie Hankel“ lud zum Tag der offenen Tür ins Café Möbius ein.

<http://www.dnn.de/Dresden/Lokales/Esperanto-Zentrum-laedt-ein>

6. November 2018

Radio Frey

"Wir wollen die Vielfalt der Landeshauptstadt der ganzen Welt in der internationalen Sprache präsentieren. Dazu fassen wir interessante Nachrichten der letzten Wochen zusammen und stellen kulturelle Aspekte Erfurts und Thüringens vor. Literaturliebhaber dürfen sich zurücklehnen und Esperantoliteratur genießen."

https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1541498400

30. Oktober 2018

Oberhessische Presse

Esperanto ist eine Weltsprache

„Ein schnell erlernter Lingo zur Verständigung der Nationen“, rappte Max Herre über die Sprache Esperanto. Kann man sie wirklich so schnell lernen? Und was ist das Besondere an ihr? Die OP hat zwei Experten getroffen.

<http://www.op-marburg.de/UNIversum/Uni-und-Stadt/Esperanto-ist-eine-Weltsprache>

gefunden am 29. Oktober 2018

Esperanto-n

Etliche Esperanto-Logos zum freien Kopieren
Verschiedenes über Esperanto zum Herunterladen
<http://www.esperanto-n.de/index.html>

29. Oktober 2018

Radio Dreyeckland

Esperanto-Magazin

Einstündige Radiosendung

Heute geht es nach Herzberg am Harz - Der Esperanto-Stadt. Ein Gespräch mit der Vorsitzenden der Deutschen Esperanto-Jugend

Michaela Stegmaier und dem Alt-Bürgermeister von Herzberg Gerhard Walter.

<https://player.fm/series/series-1419774/esperanto-magazin039-montag-29102018>

29. Oktober 2018

Markgräfler Tageblatt

Seiner Zeit in vielem weit voraus - Dr. Max Josef Metzger

Max Metzger engagierte sich in der Esperanto-Bewegung. Metzger betätigte sich ebenfalls als Liturgiereformer,

Komponist und Kirchenmusiker. Außerdem gründete und leitete er den Kyrios-Verlag mit eigener Druckerei. Metzger war Mitglied einer Widerstandsgruppe (Solf-Kreis). 1933,

1939 und 1943 wurde er von der Gestapo verhaftet. Nach der Wende des Krieges (Stalingrad) versuchte Metzger

seine internationalen Kontakte aus der pazifistischen und ökumenischen Bewegung zu nutzen, um auf einen für

sein Heimatland erträglichen Frieden hinzuarbeiten. Doch eine Gestapo-Spitzelin verriet ihn. Metzger wurde wegen

"Hochverrat" verurteilt und am 17. April 1944 enthauptet.

<https://www.verlagshaus-jaumann.de/inhalt.hausen-im-wiesental-seiner-zeit-in-vielem-weit-voraus.efeeeb83-389e-4185-835e-c9c95333cdec.html>

27. Oktober 2018

General-Anzeiger Bonn

Clemens J. Setz. Ein Meister der alten Weltsprache – William Auld

Haben auch Sie die Nase voll von Seehofers, Trumps, Putins und Erdogans auf der Welt? Wollen Sie für ein paar Minuten

ein wunderbar entlegenes, wunderbar weltfremdes, wunderbar ästhetisches Thema flüchten?

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "2018_10_27_william_auld"

26. Oktober 2018

ORF

Ö1 Kunstsonntag: "Nova Onda"

<https://oe1.orf.at/artikel/652086>

21. Oktober 2018

Schwäbische und andere

Aalen - Esperanto-Kulturpreis geht an Ilona Koutny

https://www.schwaebische.de/landkreis/ostalbkreis/aalen_artikel,-esperanto-kulturpreis-geht-an-ilona-koutny-_arid,10950412.html

https://www.schwaebische.de/landkreis/ostalbkreis/aalen_artikel,-eine-pionierin-f%C3%BCr-die-internationale-verst%C3%A4ndigung-_arid,10951627.html

<https://www.schwaebische-post.de/p/1717399/>

<https://www.aalen.de/16-aalener-esperanto-kulturpreis-an-prof-dr-ilona-koutny.119630.25.htm>

<http://ij.amu.edu.pl/wyroznienie-fundacji-fame-dla-ilony-koutny/>

27. September 2018

Lieder in verschiedenen Sprachen in der "Himmelskapelle"

Zweibrücken

Der Chor des Vereins „Zusammenarbeit mit Osteuropa“ ist zu Gast in der Himmelsbergkapelle. Auch der Zweibrücker Esperanto-Klub wird sich vorstellen.

https://www.pfaelzischer-merkur.de/region/zweibruecken/zusammenarbeit-mit-osteuropa-himmelsbergkapelle_aid-33348847

23. September 2018

Deutschlandfunk Kultur

Mit einem interessanten Rätsel über Sprachen

https://www.deutschlandfunkkultur.de/raetseln-sie-mit-wie-soll-ich-ihnen-das-vermitteln.1785.de.html?dram:article_id=428710

15. September 2018

Hinterländer Anzeiger

Sind Städtepartnerschaften noch zeitgemäß?

Immer mehr Menschen in Europa erkennen, dass die Nationalstaaten uns beschränken und beschneiden, anstatt uns zu nutzen. Die Zollgrenzen und Schlagbäume innerhalb der EU sind abgebaut, aber noch nicht die Grenzen in unseren Köpfen. Immer mehr Menschen spüren: Internationalismus ist nichts anderes als ein global aufgeblähter Nationalismus und hat sich längst als untauglich erwiesen, die Probleme der heutigen Menschheit zu lösen. Das haben Esperantisten schon vor dem 1. Weltkrieg erkannt

https://www.mittelhessen.de/lokales/region-marburg-biedenkopf/leserreporter-region-marburg-biedenkopf_artikel,-Sind-Staedtepartnerschaften-noch-zeitgemaess-_arid,1375890.html

Verda festo ĉe la Ruĝa Maro

La 20-a Israela Kongreso de Esperanto en Eilat 11-14.4. 2019, sekvata de la kunveno de MezOrienta kaj NordAfrika komisiono (MONA) de UEA en Akaba (Jordanio) 14-15.4.2019.

Ĉeftemo: Medio, paco kaj konekzisto en la Mezoriento.

Muzika akompano: Kajto kaj JoMo.


Kotizo: 300 eŭroj (inkluzivas 4 noktojn en dulita ĉambro kaj matenmanĝon en bonaj hoteloj). Ĝis 31.12.2018: 285 eŭroj.

Postkongreso: Sudaj Jordanio kaj Israelo: 15-21.4.2019. Petra, Wadi Rum, la Morta Maro, Masada, Jerusalemo, Tel-Aviv-Jafo. Profesia Esperanto-ĉiceronado. 550 eŭroj.

Norda Israelo: 22-24.4.2019. Haifa, Akko, Nazareto, Lago Galileo. 200 eŭroj.

Malaltkostaj flugoj de Eŭropo rekte al la nova internacia flughaveno de Eilat! Ekzemple: irrevene de Frankfurto: 65 eŭroj, de Milano: 67, de Amsterdamo, Warsovio, Riga, Budapesto aŭ Vieno: 85-95 eŭroj.

Informoj kaj aliĝo: <http://esperanto.org/il/ik20-mona.html>



UEA kun pli moderna membrisistemo

Dum Universala Kongreso en Lisbono la komitato de UEA decidis enkonduki novan membro- kaj kotizsistemon.

Grava instigo por la reorganizo estis la bezono, stabiligi la financon de UEA per altigo de enspezoj kaj malaltigo de elspezoj. Same grava estis la celo, adaptigi la sistemon al la modernaj teknikaj kaj komunikaj eblecoj. Tio estis la klopodo strebi al pli granda justeco de la kotizoj laŭ la financaj rimedoj. Tio konsideras la ekonomian situacion de la landoj, kiuj estas grupitaj en kvin kategoriojn, kaj la financon de la junaj membroj. Nun ankaŭ membroj en nepagipovaj landoj povas ĝui je malalta kotizo aktuale la servojn de UEA. Por junaj membroj UEA ofertas du novajn kategoriojn je forte rabatitaj kotizoj. La sistemo ja ne konsideras la financon de unuopa membro, tamen eblas, peti subtenon de fondaĵo por pagi la personan kotizon.

Al tiuj celoj kontribuis la forfalo de la nur malmulte enspeziga kategorio MG (11 €) sed kun apenaŭ utilo por la membroj, kvazaŭ simbola membreco. Pro tio UEA esperas, ke MG-membroj elektu la novan bazan kategorion, ja je pli alta kotizo, sed ankaŭ kun realaj avantaĝoj.

UEA evoluigas la ĝisnunan kategorion MJ al la starta kategorio **Membro Baza (MB)**, kies kotizo estas 44€. Oni ricevas retan aliron al la kompleta Revuo Esperanto (11 numerojn) kaj al la tutmonda kaj ĉiam aktuala delegita reto (reta jarlibro). Krome oni ricevas rabaton en UEA-libroservo kaj pli favoran UK-kotizon.

En la kategorio **MA** oni ricevas la servojn de MB kaj aldone la paperan version de la revuo *Esperanto*. La kotizo estas 74€. En ambaŭ kategorioj eblas **Dumviva Membreco** kontraŭ unufoja pago de 1320€ (DMB) aŭ 2200€ (DMA). Tio estas interesa versio por samideanoj, kiuj celas multjaran membrecon.

Daŭre eblas **Simpla Abono (SA)** de la revuo *Esperanto* kies kotizo reduktiĝis al 35€.

Restas ankaŭ la kategorio **Societo Zamenhof (SZ)** por samideanoj, kiuj volas subteni la movadon aldone al la membreco aŭ tute sen membreco. La minimuma kotizo estas 144€, sed oni povas kontribui pli. Same restas la kategorio **Patrono de TEJO (PT)** en kiu oni ricevas la paperan revuon Kontakto. La kotizo estas 88€.

Por aparte allogi junajn membrojn UEA enkondukas du kategoriojn por junuloj kun reduktitaj kotizoj, nome **MB (-50%)** por 20-25-jaruloj kaj **MB (-75%)** por junuloj kun malpli ol 20 jaroj. La kotizoj estas 22€ aŭ 11€.

La nova sistemo ofertas por la membroj realan kaj aktualan utilon. La oferto al junuloj ebligas kolekti estonte fruktojn. Aparte grava estas, ke nun ankaŭ membroj en nepagipovaj landoj povas ĝui aktuale je konsiderinde malalta kotizo la servojn de UEA. Pro tio la sistemo ne nur estas pli justa, sed pli solidara, do, pli Esperanta. La kotizoj validas por la jaro 2019 kaj por membroj en Germanio. Detalojn oni trovas en la retejo de UEA www.uea.org kaj en retejo de la landa peranto www.esperanto-buecher.de.

Universala Kongreso de Esperanto 2019 okazos en Lahtio

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto okazos 20-27-julio 2019 en la finnlanda urbo Lahtio.

Lahtio estas centro de ekonomia regiono de pli ol 200.000 homoj. La urbo ja estas konata precipe pro vintraj sporteventoj, sed allogas ankaŭ per turismaj kaj kulturaj ofertoj. Lahtio estas dense konstruita urbo. La distancoj inter hoteloj kaj la kongresejo (Isku Areena) estas inter unu kaj du kilometroj.


Kiel kutime dum UK okazos duon- kaj tuttagaj ekskursoj, ankaŭ Helsinki kaj eĉ St. Peterburgo (supozeble vizo bezonata) estas atingeblaj.

En suda Finnlando la mezaj someraj temperaturoj estas inter 20-25 gradoj, do, laŭtemperature tre agrablaj kondiĉoj.

La kotizo ĝis 31a de decembro 2018 por individuaj membroj de UEA estas nur 190€, ne-individuaj membroj pagas 240€. Kunuloj, handikapuloj, junuloj, komitatanoj pagas 95€ aŭ 145€. Ekde de la 1a de januaro la kotizoj altiĝos. Estas rekomendinda aliĝi frue.

En la retejo de UEA www.uea.org kaj en retejo de la landa peranto www.esperanto-buecher.de oni trovas detalojn pri kotizo kaj aliĝo.

D-ro Wolfgang Schwanzer
UEA-peranto en Germanio



104-a UNIVERSALA
KONGRESO de
ESPERANTO
LAHTIO-FINNLANDO
20-27 julio 2019

35-a Printempa Semajno Internacia en Hochspeyer de la 15-a ĝis la 22-a de aprilo 2019

Grava por PSI-emuloj: por certigi vian partoprenon, vi devas aliĝi multe pli frue ol antaŭe – ni rekomendas ĝis kristnasko 2018 – kaj – post ricevo de via fakturo – vi devas antaŭpagi ĝis la fino de januaro 2019. Detaloj pri la novaj kondiĉoj vi povas trovi per psi.esperanto.de/2019/#kostoj.


La PSI-teamo (psi.esperanto.de/teamo) denove ofertas buntan programon kun diverstemaj prelegoj kaj diskuttrondoj, Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, MAZI-kurso por la infanoj, ekskursoj en la regiono, arta manlaboro, danca aŭ kostuma balo, koncerto kaj teatraĵo kaj mojosa kinejo kun filmoj en 3D. Ankaŭ ne mankos la libroservo de FEL, piĝamaj rakontoj, paskofajro kun bastonpano, paskanokta diservo, paska ovoserĉado kaj finfine nia knajpo por la vesperaj diskut- kaj ludrondoj.

Hochspeyer estas ŝtata agnoskita turisma loko kaj apartenas al la asocia komunumo Enkenbach-Alsenborn ĉe la norda rando de la Platinata arbaro en la biosfera rezervejo „Palatinata arbaro - Vosges du Nord“.

Hochspeyer estas facile atingebla per aŭto. A6 Mannheim – Saarbrücken, elveturo / elirejo Enkenbach-Alsenborn kaj poste sur la B48 en direkto Johanniskruco.

Per publika trafiko je la trajnlinioj Mannheim – Saarbrücken aŭ Bingen – Primasens. De la stacidomo Hochspeyer per la buslinio 135 ĝis la junulargastejo aŭ ĉirkaŭ 25 minutoj piede.

Ni renkontiĝas en la tre moderna naturparka junulargastejo Hochspeyer, meze en la naturparko „Palatinata arbaro“ antaŭ la pordego de la palatinata metropolo Kaiserslautern.



La junulargastejo havas 121 litojn (unu-, du-, kvar- kaj plurlitajn ĉambrojn). Ĉiuj ĉambroj havas necesejon kaj duŝon.

La domo havas senbarieran ekipon, atraktivan eniran spacon kun akceptejo, bistroon, kafejon, vastan restoracion kaj infanan ludangulon. Sep seminariejoj en diversaj grandecoj, rostilo kun dometo, ejo por bivakfajro, piedpilko kaj tablotenisoj kaj pli da ofertoj estas je via dispono.

La kotizoj inkluzivas loĝadon, tri manĝojn tage kaj programon. Detalajn informojn pri la aĝkategorioj, ĉambroj kaj la aliĝkondiĉoj vi trovas sur nia paĝaro psi.esperanto.de. Memkompreneble ankaŭ partatempa kaj unutaga partopreno eblas.

Ni ankaŭ ofertas nuran manĝotarifon por tiuj partoprenantoj, kiuj ŝatas veni per ruldomo. Unutaga partopreno sen manĝoj kaj tranokto kostas 10 €.

Ĉiu familio ricevos la „Pfalz-Card“, kiu ebligas senkoston veturadon per publika trafiko kaj eniron en diversaj muzeoj kaj vidindaĵoj de la regiono (www.pfalzcard.de).

La lokoj/litoj en la junulargastejo estas ĉi-jare tre limigitaj! Do, necesas frua aliĝo kaj pago de la kotizoj ĝis la 31-a de januaro 2019, por ke ni povu garantii la deziritan ĉambron! Pro tio aliĝu baldaŭ!

Por pluraj demandoj aŭ / kaj program-proponoj skribu al psi@esperanto.de

La PSI-teamo



Historia Vortaro eksplodanta

Giganta kaj valora laboro de Bernhard Pabst

La ideo

Ofte homoj ekster Esperantujo demandas, kiel ekestas, pli bone: kiu kreas novajn radikojn en Esperanto. La kutima respondo estas, ke tiu, kiu la unuan fojon sentas veran bezonon de nova radiko, simple ekuzas neologismon en sia parolo aŭ en sia teksto. En la lasta okazo estas tre rekomendinde, atentigi pri tiu unua uzo per piednoto. Dum diskuto pri unuopaj radikoj gravas la pruvo, ke ĝin uzis jam en la fruaj jaroj de Esperanto Zamenhof aŭ alia Esperanto-pioniro, aŭ, ke tiuj unuaj aŭtoroj enkondukis taŭgan kunmetaĵon, kiu faras proponitan neologismon superflua. El tiu konstato kreskis en 1992 la ideo de Reinhard Haupenthal, kompili konkordancon, kiu indikas, kiu aŭtoro en kiu verko de 1887 ĝis 1888 uzis certan vortformon.

La Historia Vortaro de 2011

Estis Gonçalo Neves, kiu transprenis la laboron, kaj tiel en 2011 aperis la t.n. Historia Vortaro en la eldonejo Itis. Fakte la nomo estas iom misgvida, ĉar ne temas pri vortaro laŭ la kutima signifo: Estas konkordanco kun indeksoj, kie la uzanto povas trovi iun vortformon (ne nur radikon) en verko el la jaroj 1887-1888. Do, pli trafa nomo estus „Historia Indeksa Vortaro“, sed la koncerna mallongigo HIV oni devus kompletigi per la atentigo, ke ĝi infektas nur per entuziasmo por Esperanto-studoj. Tial pli bone resti ĉe „Historia Vortaro“ kun la mallongigo HV.

Plia evoluo ĝis 2017

Infektigis tiel Bernhard Pabst, konata specialisto pri la diskutoj, ĉu iuj Esperanto-vortformoj aŭ -esprimoj estas konformaj al la Fundamento. Lia kutimo, uzi en

referencoj de siaj manuskriptoj abundon da mallongigoj, montriĝis nun ĝuste la dezirata talento por giganta indekso. Li metis sur sin nome la defion, pliampleksigi la Historian Vortaron de 2011 per indeksoj el verkoj de la jaro 1889. Li mem juĝas, ke per tio HV eksplodis. Jam la eldono de 2017 havas 340 paĝojn kompare kun la 113 paĝoj de 2011. Kvankam spaco ne plu estas la problemo de elektronika manuskripto, tamen intensa uzo de mallongigoj por nomoj de aŭtoroj kaj verkoj, plie rafinita uzado de specialaj signoj kiel diversformaj krampoj ktp. montriĝis ne nur utilaj, sed ankaŭ neeviteble necesaj.

Iom malfacila, sed fruktodona uzo


Tial jes ja la uzanto ne povas sen preparo tuj ekuzi la Historian Vortaron, sed devas antaŭe trastudi la detalan enkondukon kaj la listojn de mallongigoj, sigeloj kaj signoj. La gajno estas fine, ke oni vidas eĉ ĉiun uzon de la koncerna vortformo, ankaŭ en kunmetaĵoj, en la tralaboritaj verkoj inter 1887 kaj 1889, ofte kun citaĵo aŭ rimarkigo pri eblaj eraroj ktp. do funkciante ne nur kiel indekso, sed ankaŭ kiel komentario. HV konstante kreskas, ĉar la kompleksa laboro, trastudi ĉiujn verkojn de 1889, ankoraŭ longe ne eblos fini. Tio

signifas, ke novaj versioj preskaŭ regule aperas. Mia lasta estas de 2018-09-26 kun 520 paĝoj. Se oni do volas citi la Historian Vortaron, tiam oni nepre devas indiki la daton de la versio. Tio ne estas vera malavantaĝo, ĉar gravas fine ja ne la indekso, sed la indeksita tekstero en la indikita verko, kaj tiun oni ĉiu-okaze devas kontroli, jam pro la kunteksto, por scienc-nivele labori.

2a premio Grabowski

Plian valoron havas HV pro tio, ke aperas ankaŭ ne plu uzataj vortformoj, eĉ eksmodaj radikoj, tiel ke oni havas samtempe pruvilon, ke tute normala lingva evoluo de la vortrezoro ekzistas ankaŭ en Esperanto. Plie oni povas sekvi la formigon de multaj vortformoj tra la unuaj jaroj de nia lingvo. Giganta kaj valora laboro, kiun oni ne povas tro alte taksi. Prave la Fondaĵo Antoni Grabowski ĉi-jare dum la Universala Kongreso en Lisbono atribuis la 2an premion al la aŭtoroj Gonçalo Neves kaj Bernhard Pabst. Gratulon!

Rudolf Fischer



Feedback zum Esperanto-Vortrag von Dr. Rainer Kurz im „Käpsele“ der Stuttgarter Mensaner am 18.09.2018

Herrn Dr. Rainer Kurz danke ich nochmals ausdrücklich für seinen tollen Vortrag im „Käpsele“. Dieser Infotainment-Abend war erhellend und amüsant zugleich.

Jener Vortrags- und Diskussionsabend zur Plansprache Esperanto war dank seiner profunden Kenntnisse und sympathischen, unterhaltsamen Vortragsweise ein voller Erfolg. Dass er als Pressesprecher des Deutschen Esperantobundes und langjähriger Esperanto-Sprecher ein ausgewiesener Fachmann für Esperanto ist, überrascht wenig. Dass jedoch Esperanto die Hirne und Herzen der Besucher im Sturm erobern würde, war durchaus überraschend; zumal das Käpsele-Publikum für seine skeptisch-kritische Haltung bekannt ist.

Mit Kostproben aus Filmen, Musik und Literatur gelang ihm ein spielerischer Einstieg und Auflockerungen zwischendurch. So konnte er den Teilnehmern einen Eindruck vom Klang dieser relativ jungen Sprache vermitteln. Von den Ursprüngen im Jahr 1887 führte seine Geschichtsreise bis in die Gegenwart der weltweiten Esperanto-Organisation.

Als er mit den Teilnehmern über die kulturelle Bedeutung und Einbettung – um nicht zu sagen: Nebenwirkung – von Sprache diskutiert hat, ist es allen wie Schuppen aus den Haaren gefallen, wie invasiv/übergreifend eine Sprache sein kann. Dadurch erschloss sich, welch großer Vorteil in der kulturellen Neutralität von Esperanto liegt.

Dass Esperanto praktisch nützlich sein kann, hat er nicht zuletzt durch seine eigenen Erlebnisse der privaten Übernachtungsangebote zwischen Esperanto-Sprechern weltweit bewiesen. Sein Crash-Kurs mit der überschaubaren Esperanto-Grammatik und den Vokalbildungsprinzipien zeigte, wie verblüffend einfach Esperanto ist und wie einfach es zu erlernen ist. Bei den meisten anderen Sprachen wären für so viel Verständnis wohl einige Stunden nötig gewesen. Insofern hat er uns eine auch bei spärlicher Freizeit zugängliche Sprache offeriert. Einige der Teilnehmer können diesem Angebot nicht widerstehen und tragen sich mit dem



Dr. Rainer Kurz

Gedanken, Esperanto zu erlernen. Eine Linksammlung zum Selber-Stöbern oder gar Einsteigen in Esperanto rundete die Sache ab.

Es hat sich gezeigt, dass die Esperanto-Kultur und die Mensa-Kultur sehr ähnlich sind. Beide legen viel Wert auf Bildung, Liberalität und Austausch über jegliche Grenzen hinweg. Daher ist der Vortrag gerade bei den Mensanern im „Käpsele“ sehr gut angekommen.

Ihm und seinem Esperanto-Vortrag dürfte meines Erachtens auch bei anderen Gelegenheiten, etwa bei einem Mensa-Jahrestreffen, ähnlicher Erfolg widerfahren. Und so wünsche ich Herrn Kurz viel Erfolg dabei, Esperanto unter Mensanern bekannt zu machen und den ein oder anderen dafür zu begeistern!

Dr. Rolf-Jürgen Merath

Moderator des „Käpsele“

(einer monatlichen Vortragsreihe von Mensa Stuttgart)



* **Mensa** estas internacia klubo fondita en Oksfordo en 1946, kiu celas renkontigi la inteligentulojn ĉiunivelajn. Por membriĝi nur necesas atingi poentaron en la supra 2% de psikologia testo de intelekta kvociento. En Mensa renkontiĝas bril-spiritaj homoj por interagi plene kaj libere konversacii sur bazo de egaleco kaj reciproka interkompreniĝo. Tute demokratie, Mensa estas malfermata al homoj el ĉiu lando, socia origino, aĝo, klereco, kredo, pensmaniero, kulturo, raso, vivmaniero, profesio, ktp. Mensa estas neŭtrala opinie, krede kaj politike. Estas 100 000 mensanoj en 45 landoj, kiuj opinias kaj kredas libere kaj diverse, kiuj helpas unu la alian dum vojaĝoj (orientado kaj gastigado) kaj ebligas internacian amikecon.
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Mensa>

Du tagoj de EXPOLINGUA 16.-17.11.2018

Se oni volas partopreni ĉi tiun aventuron, la planado devas komenciĝi ege frue, ĉar nur kun la rabato por vere fruaj anoncantoj oni povas pagi la kotizon.

Ni deziris mendi standon kun 2 kvadratmetroj, ĉar la plej malgranda kun nur 1 ŝajnis al ni tro malgranda. Kaj prave ni decidis! Ĵaŭdvespere ni veturis tien kun plenplena aŭtomobilo. Kvankvam ĝi kun unu tablo jam aspektis tute plena, ni iom post iom sukcesis enmeti la lignan bretaron, la transporteblan komputilon, la grandan afiŝon kun gramatikaj reguloj, la donacetojn, la altan tablon kaj eĉ la loterian radon. Almenaŭ la grandaj verdaj tuko ne foruzis spacon... Post du horoj la preparado finiĝis kaj ni povis trankvile atendi la malfermon. Ĝi okazis dum vendredo. Kiam ni alvenis al la ejo iom antaŭ la 10-a, jam estis amasoj da lernantoj ekstere. Poste ni aŭdis, ke eĉ la polico venis, ĉar ili timis, ke okazis neanoncita demonstracio antaŭ la „Rusa domo“, kie okazis la lingvo-foiro. Dum la tago multaj lernantoj venis al ni por informiĝi ĝenerale aŭ kun taskoj de la instruistoj. Kelkaj havis specialan kvizon de la foiro, por kiu ili devis eltrovi, kiajn varojn certaj firmaoj vendas. Do, kion NI

EXPOLINGUA Berlin

EXPOLINGUA BERLIN 2016 29TH INTERNATIONAL FAIR FOR LANGUAGES AND CULTURES

vendas? Ho, ni „vendas“ komunikilon kaj reprezentas lingvan egalrajtecon. Ni multe parolis kun lernantoj, studentoj kaj instruistoj. Ĉiuj estis tre komprenemaj. Venis ankaŭ kelkaj esperantistoj por iomete babili, eĉ la idistoj trapasis plurfoje kaj ricevis bakitajn verdajn stelojn de ni. Ni interkonatigis kun aliaj ekspoziciantoj. Kelkaj eldonejoj jam havis Esperanton en siaj propraj programoj. Ĉiuj ĝuis tre viglan atmosferon ĉe la stando.

Sabaton dum la dua tago estis multe pli trankvile, do ni havis pli da tempo por paroli kun la homoj. Tiun tagon venis ĉefe instruistoj aŭ lingvosciencistoj, ofte kun almenaŭ iom da scio pri Esperanto. Matene okazis Esperanto-lingvokurso en plena salono kun vere interesita publiko. Danke al multaj subtenantoj ni povis realigi nian partoprenon, kaj ni sentis nin vere ĉe la ĝusta loko. Multaj homoj, multaj spertoj kaj talentoj = granda efiko, se ili kunlaboras!

Ni kore dankas al Steve, Philip, Gerd kaj Peter de la Berlina grupo, al Michaela, Jonas kaj Chuantong de GEJ kaj al Judith de Amikumu. La ĉefa danko iras al Lu, kiu kun sia sperto de pluraj lingvo-foiroj tre bone konsilis al ni, organizis ĉion kun la EXPOLINGUA-teamo, faris la Esperanto-kurson kaj provizis nin per grandegaj verdaj tuko, kiuj faris el la blanka sterila giĉeto gemutan ĉambreton. Dankon al ĉiuj!

Barbara Brandenburg



Prof. Ilona Koutny ricevis la 16-an „Aalener Esperanto-Kulturpreis der FAME-Stiftung“

Aalen, Germanio. La 20an de oktobro 2018 la urbestro de la urbo Aalen, Thilo Rentschler, kune kun Andreas Emmerich, la prezidanto de FAME-fondaĵo, transdonis al prof. d-rino hab. Ilona Koutny la renomman kulturpremion de la Fondaĵo Alois Meiners.

La premio estas dotita per 3.000 eŭroj kaj ĝin rajtas ricevi personoj aŭ organizaĵoj, kiuj akiris al si meritojn rilate la antaŭenigon de la internacia interkompreniĝo.

La urbestro en la urbodoma, feste ornamita salono, tre varme bonvenigis la premiatan prof-inon Koutny kaj ŝian koleginon, d-rinon Katalin Kováts, kiu antaŭ du jaroj ricevis la FAME-premion. Li aplaŭdite de la ĉeestantoj diris kelkajn vortojn en Esperanto. Rentschler aprezis la laboron por kaj per Esperanto kiel subtenindan kontribuon por la internacia kompreniĝo kaj la venko de lingvaj baroj.

La laŭdparoladon faris Peter Zilvar, la gvidanto de Germana Esperanto-Centro en Herzberg/Harcmontaro. Li estas mem unu el studintoj ĉe la premiitino. Zilvar emfazis, ke la premiitino dediĉis 30 jarojn al la instruado de interlingvistiko kaj esperantologio. Li substrekis ŝian sciencan multflankecon, menciante ŝiajn laborojn



koncerne parolsintezon kaj pretigon de vortaroj. Kiel grandan meriton de Ilona Koutny Zilvar elstarigis la fondon de la Interlingvistikaj Studoj kaj ties sindonan daŭran gvidadon dum 20 jaroj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. La eksteraj 6 semestraj postdiplomaj studoj ĉefe koncernas ĝeneralan kaj aplikatan lingvistikon, internaciajn lingvojn kaj interkulturan komunikadon, koncentriĝas al la lingvistiko, literaturo kaj historio de Esperanto.

Jam antaŭ sia laboro en Poznano Ilona Koutny, kiel posteulo de prof. Istvan Szerdahelyi, instruis en la Budapeŝta universitato ELTE dek jarojn esperantologion al ĉ. 100 gestudentoj.

Katalin Kováts, gvidantino de la instruista programo de la interlingvistikaj studoj, kiel la antaŭa FAME-premiitino, per personaj vortoj varme gratulis esperantlingve al sia koleginino kaj la iama instruistino. Tradukis tion Utho Maier en la germanan.

Ilona Koutny, kiu naskiĝis en Budapeŝto kaj tie en la universitato ELTE studis i.a. esperantologion ĉe prof. István Szerdahelyi, kortuŝite kaj fiere dankis la distingon per la FAME-premio. Ŝi dankis en bona germana lingvo kaj aparte ĝojis pri tio, ke inter la multaj gastoj de la solenaĵo troviĝis ankaŭ 5 el ŝiaj iamaj gestudentoj.

Andreas Emmerich, la nuna prezidanto de FAME-fondaĵo kaj ankaŭ iama studento en Poznano, kune kun la urbestro transdonis la premion kaj belan florbukedon.

La aŭtoro de ĉi tiu teksto, mem finstudinto de la Interlingvistikaj Studoj, volonte memoras la interesan kaj afablan manieron de la premiitino instrui, defii kaj kuraĝigi nin kaj ŝian tamen severan prijuĝon de niaj studlaboroj.

La tutan solenaĵon Felix Kögel, la fama juna akordionisto, muzike ornamis per virtuoze prezentataj muzikaĵoj. La solenaĵo finiĝis per abunda bufedo, dum kiu la gastoj havis la eblecon kontakti malnovajn kaj freŝajn gekonatojn.

Horst Vogt



Sarlanda Esperanto-Ligo

La 8-a lernofesto en la german-franca ĝardeno en Saarbrücken/Sarlando.

Sub la moto „sperti - surpriziĝi - eltrovi“ okazis dimanĉe, la duan de septembro, la 8-a lernadofestivalo en la germana-franca ĝardeno en Saarbrücken.

La Sarlanda Esperanto-Ligo kaj la Becker-Meisberger-Instituto Blieskastel prezentis tie de 12.00 – 18.00 h en tri pavilonoj la jam tre faman divenradon, ekspozicion pri la „Universalaj Kongresoj“ kaj etan lernejon, kie vizitantoj povis lerni la unuajn frazojn en la internacia lingvo Esperanto. „Bazita sur nia internacia lingvo-eksperimento ĉi-jare partoprenis pli ol ol 600 vizitantoj, ĉefe gejunuloj,“ sed ankaŭ multaj instruistoj kaj universitataj profesoroj, kiuj detale informiĝis ĉe mi pri Esperanto.

La lingvan eksperimenton mem ni efektivigis per tri partoj: Unue, la partoprenantoj plenigis demandilon. Sekvis la instruado de Esperanto en la "eta lernejo", kie la universitata docento Edgar Werner Muller prezentis lecionon de la konata televida lingvo-kurso "Mazi en Gondo-Lando", por doni mallongan superrigardon pri la internacia lingvo Esperanto. Post tio la partoprenantoj povis elmontri siajn nove akiritajn lingvokapablojn per la tre



ŝatata divenrado. Post la sukcesa pruvo ili ricevis stampon al la „Lernado-Festivala pasporto“, kiu, kiam ĝi estis plenigita, ebligis partoprenon je la fino en granda tombolo. Krome oni ofertis entute pli ol 100 diversajn partoprenagadojn kaj ĉi-foje venis ĉirkaŭ pli ol 20.000 vizitantoj, multaj kompreneble ankaŭ el Francio. La Lernado-Festivalo okazis de la 12-a ĝis la 18-a horo. La eniro estis kiel kutime senkosta por la vizitantoj. Por ni mem la partopreno estis eksterordinare sukcesa kaj valora por Esperanto, tial ni jam decidis partopreni denove ankaŭ en la venonta jaro. Pliaj informoj estas haveblaj per www.lernfest-saar.de

El la Programo de Esperanto Hamburg

Ĵaŭdaj klubversperoj: en Kultur-laden St. Georg, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg 19:00 h, la membroj kolektiĝas en la kafejo. 19:30 h vespera programo laŭ la suba listo:



(speciale Esperanto). Ĝiaj ĉefaj esplortemoj estas frazeologio, interlingvistiko (esperantologio), lingvafrankoj kaj komiksoj.

Renkontiĝejo estos la salono 1/2 en Kultur-laden St. Georg, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg. Senkosta eniro. *Der Vortrag von Prof. Dr. Sabine Fiedler gibt einen Überblick über die Resultate des Entwicklungsprojektes über die heutige Nutzung der Plansprache. Sie beleuchtet die Esperanto-Kommunikation in vielen verschiedenen Situationen (wie z. B. die tagtägliche Konversation, wissenschaftliche Vorträge oder Debatten). Die Hauptthemen des Vortrags sind die Rolle des Humors in der Esperanto-Kommunikation und die Weiterentwicklung der Sprache.*

Ĵaŭdo 14.03.2019

Prelego de prof-ro dr-o Sabine Fiedler: Esperanto – novaj esploroj pri lingvouzo kaj parolkomunumo.

La prelego donas superrigardon pri rezultoj de esploroj projekto pri la nuna uzo de la planlingvo. Ĝi prilumas Esperanto-komunikadon en plej diversaj situacioj (kiel ekz. ĉiutaga konversacio, sciencaj prelegoj, debatoj). Ĉefaj temoj de la prelegoj estas la rolo de humuro en Esperanto-komunikado kaj la pluevoluo de la lingvo.

Sabine Fiedler estas lingvisto en la Universitato de Leipzig, kie ŝi doktoriĝis pri la angla lingvo kaj habilitiĝis en Ĝenerala Lingvistiko per studo pri la frazeologio en planlingvoj

Freitag 15.03.2019

Vortrag in deutscher Sprache: Prof. Dr. Sabine Fiedler: Mehr als Krach, PENG, Arrrrrrgh – Comics zwischen Literatur, Massenmedium und Kunst.

Comics können aus sehr unterschiedlichen Perspektiven betrachtet werden. Einige sehen sie als literarische Gattung, andere als Massenmedium, wieder andere als Kunstform (in Frankreich, wo Comic la bande dessinée, BD heißt, spricht man bekanntlich von der „neunten Kunst“). In ihrer semiotischen Funktionsgemeinschaft von Sprache und Bild sind sie sowohl hinsichtlich ihrer erzählerischen Potenzen als auch ihrer

ästhetischen Wirkungen unverwechselbar. In ihnen wird Bedeutung durch eine Vielfalt an Kommunikationsebenen und verbalen Gestaltungselementen (Erzählertext, mündliche Rede in Sprechblasen, Inserttexte, Soundwords u.a.) zum Ausdruck gebracht. Der Vortrag beginnt mit einem kurzen Überblick über die Geschichte des Comics, wird danach das Zusammenwirken zwischen der visuellen und verbalen Ausdrucksebene näher beleuchtet und betrachtet abschließend die Leistungen des Comics unter zwei ganz speziellen Aspekten. Das sind die Dokumentation von Zeitgeschehen durch vielfältige Möglichkeiten der Bezugnahme auf sprachliche und außersprachliche Realität und die Vermittlung von Einblicken in Sprachwandelphänomene.



Sabine Fiedler ist Sprachwissenschaftlerin am Institut für Anglistik der Universität Leipzig. Sie promovierte 1986 auf dem Gebiet der englischen Fachsprachenforschung und habilitierte sich 1999 in Allgemeiner Sprachwissenschaft (in Interlinguistik) mit einer Arbeit zur Phraseologie in Plansprachen (insbes. Esperanto). Zu ihren Forschungsschwerpunkten gehören Phraseologie, Interlinguistik/Esperantologie, Sprachenpolitik, Lingua-franca-Kommunikation und Comics. Seit 2011 ist sie Vorsitzende der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. Veranstaltungsort ist der große obere Saal im Kulturladen St. Georg, Alexanderstraße 16, 20099 Hamburg. Eintritt 5 Euro bzw. 3 Euro (reduziert).

Esperanto und Europa

Die 1. Europäische Bürgerbegegnung vom 15. – 18. Nov. 2018 in Kassel wurde von der Europa-Union Kassel und Pulse of Europe organisiert.

Es gab acht Workshops (Europäisches Geschichtsbewusstsein, Menschenrechte und Rechtsstaatlichkeit in der europäischen Aussenpolitik, Junge Europäische Föderalisten, Wissenstransfer in Europa, Bürgerbeteiligung in Europa, Recht in Europa, Soziales Ehrenamt, Esperanto) mit je drei Arbeitseinheiten. In der Eröffnungsfeier wurde die Europahymne, die offiziell ja keinen Text hat, in der Esperanto-Version von Umberto Brocatelli und den daraus abgeleiteten nationalsprachigen Versionen (so, wie von der Europa Esperanto-Unio geschaffen) gesungen, ein bisher einmaliges Ereignis. In der Kundgebung vor dem Rathaus im Zentrum Kassels wurde ein Europa des Friedens, der Freiheit und Solidarität gefordert mit einer eindeutigen Absage an rechte Politik und populistische Bestrebungen. Die Esperantosprecher aus Deutschland, Polen, der Ukraine und Spanien waren mit ihren Flaggen unübersehbar dabei.

Gruppe (Workshop) Esperanto

Anwesend waren insgesamt 9 Personen, hierunter 7 Deutsche (2 Frauen, 5 Männer), 1 Spanier und eine Ukrainerin. Sprachen in den drei Arbeitseinheiten der Gruppe: Esperanto und Deutsch.

Die 1. Arbeitseinheit hatte den Titel „Esperanto in einer Stunde – Informationen zur neutralen internationalen Sprache und ihrer Anwendung“. In Form eines Expresskurses wurde die Sprache mit ihren Besonderheiten, speziell unter den Gesichtspunkten neutral, international und leicht erlernbar, sowie ihre aktuelle Verbreitung in der globalisierten Welt präsentiert und diskutiert. Die Tauglichkeit von Esperanto als weltweites Verständigungsmittel wurde anerkannt.

Die 2. Arbeitseinheit hatte den Titel "Esperanto – neue Aspekte einer alten Idee. Die nachhaltige Dimension von

Esperanto als zweiter Sprache für alle". Hier wurde insbesondere hervorgehoben, dass Esperanto als gemeinsame Sprache aller Bürger - im Gegensatz zu allen ethnischen Sprachen - aus sich selbst heraus ("von Anfang an") drei besondere Eigenschaften hat:

1. Integrierende Sprachigkeit - Esperanto schafft einen transkulturellen Raum ohne kommunikative Trennungen, einen Raum, der mehr ist als die Summe der im jeweiligen Fall vorhandenen Einzelkulturen.

2. Demokratische Zweisprachigkeit. Die Anwendung von Esperanto bedeutet sprachliche Gleichheit - niemand hat einen Vorteil, weil seine Muttersprache als gemeinsame Sprache genutzt wird.

3. Ökologische Angepasstheit. Die konsequente Anwendung der neutralen Sprache Esperanto vermindert die Zahl der Übersetzungsrichtungen in z.B. der Europäischen Union von 552 auf 48, was zu einer erheblichen Ersparnis an materiellen und systemischen Ressourcen im Kommunikations- und Übersetzungssystem dieser Organisation führt. Darüber hinaus wurde festgehalten, dass auch Kommunikation als Teil unserer Kultur grundsätzlich nicht Zerstörung von Natur rechtfertigt. Diese drei Eigenschaften der neutralen Sprache Esperanto stehen voll im Einklang mit den drei Leitprinzipien der Vereinten Nationen, nämlich Frieden, Menschenrechte und Nachhaltige Entwicklung. Keine ethnische Sprache kann das von sich behaupten.

Die 3. Arbeitseinheit der Gruppe Esperanto hatte den Titel "Praktische Beispiele aus Europäischen Bürgerbegegnungen mit Esperanto". Es wurden im einzelnen drei aktuelle Esperanto-Projekte angesprochen und diskutiert.

1. Der diesjährige Esperanto-Weltkongress in Lissabon mit über 1500 Teilnehmern aus der ganzen Welt.

2. Die regelmäßigen Treffen der Esperantisten aus der Esperantostadt Herzberg am Harz und deren Zwillingsstadt Góra in Polen.

3. Die internationalen und transkulturellen Aktivitäten im Fischerdorf Guardamar del Segura südlich von Alicante (Spanien), wo in diesem Jahr in Erinnerung an einen der ersten spanischen Esperantisten zu Beginn des letzten Jahrhunderts, nämlich den Forstingenieur Ricardo Cordoniú, und an die Gründung der Esperanto-Gruppe Anfang dieses Jahrhunderts eine Baumpflanzaktion am Tag des Baumes durchgeführt wurde, die zum Ziel, hatte, beispielhaft und in internationalem Rahmen zu zeigen, dass Kultur und Natur zusammengedacht werden müssen.

Wolfgang Günther

(w.guenther.esperanto@web.de)

Internacia Esperanto-Konferenco 2019

De la 13-a ĝis la 19-a de julio en Kondoros, Hungario. Temo: Hungara kulturo

Loka adreso: Pál KOZSUCH, Csabai út 2, HU-5553 Kondoros, Hungario. Poŝtelefono: +33 66/388-807, retadreso: *pauljuno@freemail.hu*

Loko

Kondoros [kondoroŝ] estas grandvilaĝo en Hungario, en regiono Suda Ebenaĵo, je 100 km de Kecskemét [keĉkemēt] kaj 45 km de Rumanio. Kondoros situas sur la ĉefvojo Kecskemét-Békéscsaba [bekeŝĉaba]

Konferencjo

La konferenco okazos en la tradicia malnova restoracio Ĉardo.

Loĝado

- Gastejo kun klimatizitaj ĉambroj, 13 € / nokto / persono. Nur 5 ĉambroj haveblas.
- Gastoĉambroj dise en la vilaĝo, 10 € / nokto / persono
- Studenta hejmo, 5 € tage, 5-6-litaj ĉambroj kun komuna necesejo kaj duŝejo.

Noto: la prezoj ne estas garantiitaj, kaj povas varii laŭ la aktuala kurzo. Ankaŭ eblas malkoste tendumi.

Manĝoj

La konferencjo estos la Ĉardo mem, tie estos antaŭpagebla matenmanĝo kaj ankaŭ tagmeza kaj vespera menuoj. Matenmanĝo kostas 3 €, tagmanĝa menuo kostas 5 €, vespermanĝa menuo 4 €. Kompreneble ĉiam eblas manĝi libere laŭ la karto de la restoracio.

Dumkonferenca programo

Matene: tema programo, statuta programo, libroservo.

Posttagmeze kaj vespere:

- Interkona vespero.
- Festa vespero kun loka citromuziko.
- Ekskurso sur ĉevaltiritaj ĉaroj.
- Vizito de apudaj famaj kuracbanejoj.
- Ekspozicioj de lokaj fotistoj.
- Vizito ĉe lignoskulptisto.
- Kaj multaj aliaj surprizoj...



Aliĝilo al Internacia Esperanto-Konferenco 2019

S-ro - S-ino (familia nomo).....
 (persona nomo).....
 (kompleta adreso)

 (retadreso)

Mi mendas loĝadon por la noktoj: (12) 13 14 15 16 17 18 (19) en:

- Gastejo 2-3-lita ĉambro
- Gastoĉambro 2-3-lita
- Gastoĉambro 1-lita
- Studenta domo (4-6-lita)
- Mi petas aldonajn informojn por atingi la konferencjojn

Aliĝkotizo (en €)

La Jara Kotizo (JK) al OSIEK estas egalvaloro de 25 poŝtmarkoj por enlanda letero. Por OSIEK-anoj, la aliĝkotizo al IEK estas obligo de la JK, kun minimuma kaj maksimuma valoro.

periodo	< 2019-02-28			< 2019-04-30			Poste		
OSIEK-ano	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks
	20€	6*JK	60€	25€	7,5*JK	75€	35€	10*JK	100€
Nemembro	80€			100€			120€		
Partatempa partopreno: po 24 € tage									

Rabato 50 %-a por junuloj ĝis 26 jaroj, handicapuloj.
Rabato 30 %-a por samadresa kunulo de la aliĝinto.

La kotizo inkluzivas: organizajn elspezojn, konferencajn materialojn, partoprenon en la programo, vizitojn en la urbo, interkonan vespermanĝon. Ĝi ne inkluzivas loĝadon, nek manĝojn. La kotizo estas ne repagebla.

Solidareca fonduso

Estas bedaŭrinde, ke ekonomiaj cirkonstancoj tre malhelpas kelkajn samideanojn partopreni kaj kontribui al niaj konferencoj. Per via pago al „Solidareca fonduso“ ni povas malaltigi konferencajn kaj loĝejajn kotizojn al nivelo akceptebla por ili.

Bilanco

Mi pagas por konferenca kotizo: €; por loĝado:€;
 por postkonferenca aranĝo: €; por solidareca fonduso:€; Entute : €; Mi pagas samtempe kun tiu ĉi aliĝilo:€; Restas al mi por pagi antaŭ 1a de junio 2019:€

Kiel pagi (eventualaj bankkostoj estos eltiritaj)

Poŝtkonto de la kasisto Eric Laubacher IBAN: FR47 2004 1000 01013998 7R02 028; BIC: PSSTFRPPPAR
UEA-konto de OSIEK: osie-h; FEL-konto de OSIEK: osie-h
Por hungaraj ĉeko al la organizanto.

Dato..... Subskribo.....

Kalendaro

Decembro 2018

27 dec – 03 jan: LUMINESK' – la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio en Königswinter/Germanio. Demandoj ĉe Andreas Diemel: demandoj@luminesk.de, aŭ telefone +49 203 2964 877

27 dec – 03 jan: La 17-a Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden/Germanio. Informoj ĉe <http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr>

28 dec - 04. jan: 10-a Jarfina Esperanto-Semajno JES en Storkow apud Berlino, en Germanio. Organizas: Germana Esperanto-Junularo, retadreso: gej@esperanto.de

Januaro 2019

03 - 07: 37-a Poludnica en Liptovský Ján, Slovakio. Poludnica 2019 estas renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj. Ĉefa temo: esperantistoj-vojaĝintoj. Organizas: Liptova Esperanto-Klubo (LEK), Školská 4, 031 01 Liptovský Mikuláš, Slovakio. Retadreso: poludnica83@gmail.com

17 - 20: PUSTEVNY 2019 – Esperanta vintro en Pustevny, Ĉeĥio. Vintra skiado, vizito de festivalo de glaciaj statuoj, ebleco de kurso de Esperanto. Organizas: Pavol Kaščák, Bartošovice 15, Ĉeĥio. Retadreso: verdstacio@gmail.com

Februaro 2019

23: Memoro pri Ino Kolbe en Leipzig, Germanio. Ino Kolbe (28.02.1914 - 16.02.2010), estimita esperantistino, 11.00 horo, rendevuejo tombejo (Nordfriedhof, Berliner Str.121) 14:00 horo kunveno memoriga tabulo ĉe la domo (Delitzscher Str. 64). Organizas: Hans-Joachim Gunkel, Voss Str. 7, D-06110 Halle, Germanio. Retadreso: HajoGunkel@t-online.de

27. feb – 03. mar: Bibliaj Tagoj en Mainz, Germanio. La Bibliajn Tagojn ofertas "Esperanto-Liga für Christen in Deutschland", Germana Sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Ĉiu, kiun interesas Kristanismo, estas bonvena. Ni diskutas, kantas, diservas, ĉio en ekumena etoso. Posttagmeze ekskursoj al Wiesbaden. Organizas: Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde, Germanio. Retadreso: fischru@uni-muenster.de

Marto 2019

02 - 09: Mediteranea Esperanto-Semajno en Restadejo Val d'Esquiere, Les Issambres, Francio (Lazura Marbordo). Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono? Venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro... Organizas: Christine Graissaguel, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progres, FR-83600 Fréjus, Francio. Retadreso: kris_grai@hotmail.fr, tel: +33 (0) 4 94 95 66 18

02 - 09: 26-a Koruso-staĝo en Verniolle, Francio. Korusa laboro sub gvido de nederlanda Rineke Hoens. Plurvoĉaj kantoj el diversaj tempoj & teritorioj. Laŭkutime pluraj partoprenontoj

alportos siajn muzik-instrumentojn por folk-lud-adi laŭeble ankaŭ kun lokaj spertuloj. Komencantoj ricevos Esperantan kurson, ĉu ankaŭ vi? Eblas skii, promeni, turismumi...

Organizas: Jorgos kaj Monik', Garrigues, Muelejo, FR-09600 Limbrassac. Retadreso: tutpeko@aliceadsl.fr

22 - 24: Esperanto Studsemajnfino en Krikkenhaar, Bornerbroek, Nederlando. Ni instruas Esperanton en 4 diversaj niveloj dum la semajnfino. Organizas: Esperanto Nederland, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, Nederlando. Retadreso: studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

Junio 2019

07 - 10: Germana Esperanto-Kongreso en Neumünster (Germanio). www.esperanto.de/gek2019

Julio 2019




06 - 14: 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55) en Panevėžys (Litovio).

Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 55-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-55). La aranĝo estas dediĉata al la 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio. Eblas aliĝi rete, sendante la aliĝilon al litova.ea@mail.lt. Retan

aliĝilon (http://esperanto.lt/aligxilo_BET.html) kaj aktualajn informojn vi povas trovi en la retejo de BET-55 <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55>.

20 - 27: La 104-a

Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio, Finnlando. Organizas: Universala Esperanto-Asocio. Retadreso: kongresoj@co.uea.org; pliaj informoj troveblas sur la paĝo 14, en la retejo de UEA www.uea.org kaj en retejo de la landa peranto en Germanio www.esperanto-buecher.de (musklaku supre al "UEA-UK")



104-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO LAHTIO-FINNLANDO 20-27 julio 2019

20 - 27: Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (85-a IKBE) en Lahti, Finnlando. Okaze de la 100-jara datreveno de Steleto IKBE-kongresanoj rajtas partopreni la samloke kaj samtempe okazontan Universalan Kongreson de Esperanto (104-a UK). Prelegoj i.a. pri signifo de Esperanto por blinduloj kaj ilia internacia kunlaboro, novaj helpiloj, lumtekniko. Organizas: Steleto, Esperanto-asocio de vidhandikapuloj, Pietarinkatu 10 D 27, FI-00140 Helsinki, Finnlando. Retadreso: steleto@pp.inet.fi

28. jul - 04. aŭg: 75-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Liptovský Hrádok, Slovakio. Ĉeftemo de la kongreso: Kontraŭ antaŭjuĝoj. Organizas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. Retadreso: ijk2019@tejo.org

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen **Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes** aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 42 – Bericht vom 16. Esperanto-Kulturpreis 2018 der Stadt Aalen und der FAME- Stiftung zur Förderung internationaler Verständigungsmittel



◀ im Bild: Thilo Rentschler, Oberbürgermeister der Stadt Aalen, Andreas Emmerich, Vorsitzender der FAME-Stiftung; Prof. Dr. Ilona Koutny, Preisträgerin des 16. Aalener Esperanto-Kulturpreises



▲ Dr. Katalin Kováts (15. Preisträgerin) mit OB Rentschler und Prof. Dr. Ilona Koutny

16. Aalener Esperanto-Kulturpreis 2018

Die Stadt Aalen und die FAME-Stiftung zur Förderung internationaler Verständigungsmittel haben am 20. Oktober 2018 ihren 16. Aalener Esperanto-Kulturpreis an Frau Prof. Dr. Ilona Koutny aus Posen verliehen. Eine feine kleine Festversammlung von etwas mehr als 70 Gästen, darunter auch einige ihrer Absolventen, verfolgte die Verleihung und konnte sehen, wie stolz und dennoch bescheiden auftretend die Preisträgerin ihre Ehrung entgegennahm, die die überreichte Urkunde so begründete:

„Sinjorino Koutny ricevas tiun premion pro elstara persistema agado por la planlingvo Esperanto kaj ŝiaj meritoj pri la scienco interlingvistika. Krom daŭra instruado de lingvo Hungara kaj de lingvistiko en la ugro-finna katedro ŝi fondis en 1998 la internaciajn postdiplomajn studojn de interlingvistiko en UAM, la Universitato Adam Mickiewicz de Poznano.“

Als Laudator konnte die FAME-Stiftung einen von Ilonas ersten Posener Absolventen gewinnen: Peter Zilvar unterstrich detailreich, wieso Ilona Koutny diese Auszeichnung längst verdient hatte, nachdem sie fast ihr ganzes Leben der Arbeit in und für Esperanto und internationale Verständigung gewidmet hatte.

Ein entsprechender Scheck samt Blumenstrauß durften neben der Urkunde natürlich auch nicht fehlen.

Leitlinien der FAME-Stiftung

Als bestens informiert zeigte sich der Aalener Oberbürgermeister Thilo Rentschler, der ausstaffiert mit seiner glänzenden Amtskette, die Veranstaltung eröffnete und dabei in kompetenter Weise die Grundsätze der FAME-Stiftung darlegte und dadurch aufzeigen konnte, wie modern diese Ansprüche sind, die die FAME auch an sich stellt, selbst wenn sie schon 30 Jahre auf dem Buckel haben (am 12. Dezember 1988 erhielt FAME die Anerkennung als Stiftung nach deutschem Zivilrecht). Das hinterließ gleich einen hervorragenden Eindruck bei den Gästen, auch unter Insidern.

„**Idealismus, Realitätsinn und Professionalität**“ – das fordert die FAME-Stiftung, nicht nur für sich selber. FAME setzt sich ein für eine bessere Welt, hat aber etwas gegen sog. „Weltverbesserer“. Unterstützen möchte sie neue Aktivitäten „mit Esprit und Kreativität“.

Doch ist eine Feier zum 30. Geburtstag gar nicht im Sinne ihrer Ziele; der Stiftung ging es immer um den effizienten Einsatz für internationale Verständigungsmittel, was ja auch ihre Satzung so unterstreicht:

- „Internationale Verständigung
- vermeidet und klärt Missverständnisse auf,
- baut Vorurteile ab,
- erweitert die Denkweise,

- weckt Verständnis und Toleranz für Verhalten und Interessen der anderen
- und schafft ein Gefühl der Verantwortung für eine weltweite Gemeinschaft,
- über die örtliche Ebene hinaus.“

Folgerichtig ergeben sich damit auch die Anforderungen an mögliche Preisträger ihres Aalener Esperanto-Kulturpreises: den Preis können Personen, Organisationen und Institutionen erhalten, die sich

- während beträchtlich langer Zeit
- Verdienste um die Förderung internationaler Verständigungsmittel
- im Rahmen der Satzungsziele der FAME-Stiftung
- durch Schaffen, Verfassen, Nutzung oder Verbreitung kultureller Werte erworben haben.

Bemerkenswert war auch der musikalische Rahmen der Veranstaltung, durch den Felix Kogel als noch junger Akkordeonist virtuos begeisterte – eigentlich kein Wunder bei einem Bundespreisträger von Jugend musiziert ...

Die Preisträgerin unterstrich in ihren Dankesworten, dass sie ihre Auszeichnung auch als Anerkennung der universitären Ausbildung von Fachkräften ansieht: „Wir brauchen qualifizierte Personen, die mit Fachkenntnissen und Diplom in Schulen und Universitäten unterrichten können und die internationale Sprache auf verschiedenen Ebenen authentisch und mit Gewicht verbreiten können.“ Doch diese internationalen Studien in Esperanto, die Posen bietet, sind bislang leider einzigartig und fanden noch keine Nachahmer.

Besonders beeindruckt hat auch Dr. Katalin Kováts, welche eine lange Anreise nicht gescheut hatte, um als vorherige 15. Preisträgerin von 2016 ein Grußwort an die Festversammlung zu richten. Ich zitiere kurz daraus, um dann diesen Kurzbericht in Esperanto fortzusetzen:

„Mi estas kortuŝita, kaj estas granda ĝojo por mi stari antaŭ vi kiel la antaŭa premiito por nun transdoni la torĉon al mia samlandanino, iama instruistino, kolegino kaj amikino. Mi jam scias, kia honoro estis ricevi vian distingon, atenton kaj poste la multajn gratulojn.

Mi fieras pri mia FAME-premio, la Esperanto-Kulturpremio de Aalen, kaj la saman fieron mi deziras ankaŭ al Ilona. Ŝi vere meritas nian atenton, ĉar sen ŝiaj klopodoj ne estus universitatnivela diplomita interlingvistoj kaj esperantologoj. Nia movado multe ŝuldas al ŝi, tial nur mallonge:

- En la nomo de mia retejo *edukado.net*,
- de la instruistoj de Esperanto tutmonde,
- de Esperantic Studies Foundation,
- kaj la studentoj kaj kolegoj de la Interlingvistikaj Studoj en Poznan, mi tutkore gratulas kaj dankas ŝin kaj deziras al ŝi pluan energion kaj emon daŭrigi sian laboron. Dankon, Ilona!“

Raporteto pri okazoj rande de solena transdono

de Alena Esperanto-Kulturpremio de urbo Aalen kaj la FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj:

Tiun premiadon ne nur subtenis la urba administracio kaj la fondaĵo FAME, sed ankaŭ alia fondaĵo. La Usona ESF (Esperantic Studies Foundation) kontribuis al la vojaĝkostoj de la 15-a FAME-premiito Katalin Kováts, kiu investis tutan nokton por aŭtomobile veturi el norda Nederlando al la sudgermana flughaveno Stuttgart, por tie surprize akcepti sian karan amikino Ilona Koutny.

La surprizo bele sukcesis, ĉar al Ilona nur estis anoncita, ke iu atendas ŝian alvenon kun verda flageto, por transporti ŝin al la hotelo en Aalen.

Ili do duope alvenis en Aalen jam vendrede tagmeze kaj tie povis ĝui la mezepokan ĉarmon en la urbokerno de la Esperanto-urbo Aalen akompane de belega aŭtuna vetero, kiu poste allogis ilin al matena multkilometra migrado tra la Ŝvaba Ĵuraso kun ĝiaj kolorigitaj arbaraj montetoj.

En la urbo mem, sed ankaŭ en ties ĉirkaŭaĵo, ja allogus multaj alternativoj, kiujn viziti ne permesis la limigita tempo de la gastoj, kiuj ankaŭ celis iom ripozi post la ne mallonga alvojaĝo:

la optika muzeo de monde fama entrepreno Carl Zeiss, la Unesko-kulturheredaĵo Limeso-muzeo Aalen, la subĉielaj elfosaĵoj kaj ekspoziciaĵo de la limeso, kelkaj interesaj preĝejoj en la regiono, eĉ ne la urbo Ulm kaj ties plej altaj preĝejturo.

Por refreŝigi kaj ripozi tre bone plaĉis al ili la oferto de la hotelapuda termobanejo, kies aspekto ja konstruiĝis laŭ Romia maniero.

Iom de nia komuna renkontotempo ni dediĉis ankaŭ al vizito de la Germana Esperanto-Biblioteko, kie ili admiris la plene ŝtopitajn bretarojn kun amaso da libroj kaj gazetkajeroj.

Precipe imponis la gastojn nia bretaro (fotoj sur la dorsa kovrilpaĝo) kun vere tre multaj titoloj ne plu necesaj, kiuj atendas uzontojn interesitajn – jen bela okazo kaj oferto por ili! Kaj ili do elektis, ĉar ili trovis inda por servi al studentoj kaj lernantoj konsiderinde grandan kvanton – mi tre ĝojas, ke tiel multaj superfluaĵaj titoloj trovis taŭgajn novajn hejmojn (vidu la fotojn sur la dorsa kovrilpaĝo).

Tre impresis la premiitan Ilona ankaŭ la transdona solenaĵo, okazanta en ĉeesto de multaj vizitantoj, inter kiuj montriĝis esti kelkaj disĉiploj el ŝia longjara instruado en la interlingvistikaj katedroj de Budapeŝto kaj Poznano. Se mi forgesas iun nomon, tiu s-ano bv. pardonu mian forgeseman menson: aperis por gratulo Katalin Kováts, Andreas Emmerich, Horst Vogt, Bernhard Westerhoff kaj Petro Zilvar.

Utho Maier

24-a KEKSO en Heidelberg



Dum sufiĉe somera oktobra semajnfino ni ĉiuj alvojaĝis Heidelbergon.

Tiu urbo estas por tri partoprenantoj ilia hejmurbo, kio havis la agrablan efekton, ke ĉiuj aliaj partoprenantoj havis spertajn urbogvidantojn. Dank' al la subteno de la BAVELO-teamo ni ja ankaŭ havis luksajn lit- kaj manĝkondiĉojn kaj ŝancojn partopreni en pli profesiaj prelegoj, ol normale okazas en keksujo. Tiel la spertuloj povis diskuti pri internacia politiko, kaj havi enkondukon al kiel organizi sukcesan internacian helpprojekton pere de Esperanto. Sed ankaŭ por la komencantoj klare ekzistis enkondukaj kursoj, organizataj de internaciaj instruistoj.

Eble ja la aktive kreema parto de la KEKSO mankis ĉifoje, sed fabelaj elvidoj de la kastelo, la kastela ĝardeno kaj en la nokto al la trankvile fluanta rivero lasis tiun parton al la imago de ĉiuj mem. Sekvan fojon ni organizu pli bonan propran komencantan kurson, ĉar mi pensas, ke laŭ stilo kaj rapideco ni povus havi iun pli celgruptaŭgan.

Paul Würzt

La 25-a KEKSO: de la 7-a ĝis 10-a de junio 2019 KEKSO okazos kune kun la Germana Esperanto-Kongreso (GEK) en Neumünster.

Tial ni bezonas vian kreemecon. Ni volas enmiksiĝi en la programon de GEK kaj montri nian junulan energion. Vi povas veni kostumita, proponi ludojn aŭ aliajn programerojn al ni kaj ni prizorgos la reston.

La ejo provizas por ni kuirejon, kie ni povas memstare prizorgi niajn veganajn manĝojn kaj interbabili kun partoprenantoj de la kongreso. Kun dormsakoj kaj matracetoj ni dormos en la amasloĝejo.

Kotizoj por novuloj kaj eksterlandanoj: 0€. Kotizoj por membroj de GEJ: 30€. Kotizoj por ne-membroj de GEJ: 45€. Ni petas ĉiujn partoprenantojn aŭ kunporti keksojn aŭ fruktojn aŭ krompagi 10€. Ni antaŭĝojas vian ĉeeston!


Aliĝi vi povos ekde nun en nia retpaĝo: www.esperanto.de/de/enhavo/anmeldung-zum-kekso-aliĝo-al-kekso

Michaela Stegmaier

„Donacetoj subtenas amikecon“

– oni diras. Tio precipe ĝustas kristnaske, sed ĉiam malfacilas trovi bonajn donacojn. Tial ni kolektis kelkajn ideojn (seriozajn aŭ malseriozajn – sed al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras):

La Fundamento de Esperanto: Tion oni povas uzi por multege da aferoj: fiksi ŝancelajn tabloj kaj seĝoj, uzi ĝin kiel kusenon aŭ eĉ legi en ĝi! Aliflanke: Ĉu persono,



kiu ankoraŭ ne posedas La Fundamenton eĉ povas sin nomi Esperantisto?

Ŝildo kiu montras „-n“: Oni povas uzi ĝin por helpi al homoj plibonigi siajn lingvokonojn. Kaj ankaŭ por ege ĝeni ilin kaze se oni volas esti sola dum Esperanto-renkontiĝo.



Kartoj kontraŭ Esperantujo: Vi povas ricevi la



ludon senkoste interrete (<https://timsk.wordpress.com/2014/02/05/kartoj-kontrau-esperantujo/>), kaj ĝi estas bona donaco, ĉar vi povas printi kaj eltranĉi la kartojn. Vi ankaŭ povas elprovi la ludon antaŭ ol fordonaci ĝin, tiel vi ankaŭ ĝuos la donacon (se vi tre ĝuas ĝin, faru du por ke vi povu gardi unu).



Ĉokolado



Ĉokolado: Fakte ne nur al esperantistoj, sed al ĉiu vi povas donaci tion. Preskaŭ ĉiu ŝatas ĉokoladon.

Adventan florkronon kun kvin kandeloj: Unu por ĉiu dimanĉo en advento kaj unu por la naskiĝtago de Onklo Zamĉjo. La kvina kandelo memkompreneble estu verda.



Mondmapo por indiki kiujn landojn vi jam vizitis: Tiel multe pli bone eblas plani, kiujn kongresojn viziti venontjare (aŭ kie organizi ilin). Kaj eblas facile fari:



Vi nur devas aĉeti grandegan mapon kaj multajn pinglojn (kiujn vi ankaŭ povas uzi por servi fromaĝon kun vinberoj, se vi havas tro).



La Majstro de l'Ringoj de William Auld: Ĝi ne nur estas bona libro, kiu ege legeblas, se vi legas ĝin, vi lernos mojosajn novajn vortojn kiel „embuski“ aŭ diversaj specoj de armiloj.

Ne gravas, kiujn donacojn vi decidas transdoni, mi deziras al vi kaj via familio feliĉan kristnaskan feston.

Annika Förster





Hautshaltsplan DEJ

Der Haushaltsplan für das Jahr 2019 wird dominiert von den Ausgaben zum JES 2018/19, denen aber erwartete Einnahmen in ähnlicher Höhe gegenüberstehen. Diese werden allerdings noch für das Jahr 2018 verbucht.

Die projektbezogenen Einnahmen und Ausgaben beziehen sich auf das Projekt "Fostering Equality in Youth", das Anfang 2019 seinen Abschluss findet. Das Projekt war sowohl inhaltlich als auch finanziell ein Erfolg und Projektgewinne werden von uns an die teilnehmenden Organisationen ausgeschüttet.

Da wir im Budget unsichere Kosten eintragen, unsichere Gewinne aber nicht, sind für Spenden, Subventionen und das kommende JES null Euro veranschlagt. Für die zwei KEKSOs, die nächstes Jahr stattfinden sollen, und die als Werbeveranstaltungen auf Verlust ausgelegt sind, sind dagegen Kosten eingetragen.

Fragen zum Haushaltsplan könnt ihr mir gerne per E-Mail schicken oder auf der Hauptversammlung während des JES stellen.

Lars Hansen

Name	Einnahmen
Einnahmen (Summe)	12700
Spenden	0
Mitgliedsbeiträge	1500
Fördergelder (allgemein)	0
Projektsubventionen	11200
JES 2019/20	0
Zinserträge	0
Ausgaben (Summe)	-48060
Treffen (Summe)	-45450
JES 2018/19	-33000
Projektkosten	-4000
Auszahlungen Projektsubventionen	-8000
KEKSO 25 (Neumünster, parallel zum GEK)	-200
KEKSO 26	-100
JES 2019/20	0
Esperanto-Kurse	-150
Geschäftskosten (Summe)	-2610
Verwaltung	-1800
Versicherung	-260
Bankkosten	-200
Vorstandskosten	-300
sonstiges	-50
Fahrtkostensubventionen	0
Gesamt	-35360



Neuigkeiten aus dem Vorstand:

- wir haben einen Flyer neu aufgelegt „Esperanto – lingvo kiel ludo“; - die DEJ hat jetzt eine Visitenkarte (frisch gedruckt für die Expolingua in Berlin)

→ das alles könnt ihr im BerO (Berlina Oficejo) bei Sibylle Bauer bestellen, um selbst damit zu werben (schreibt einfach eine Mail mit eurer Bestellung an sibylle.bauer@esperanto.de).

Severin und Julia werden aus dem Vorstand ausscheiden. Wir suchen also dich für ein Vorstandsamt oder eine zwanglose Teilnahme in einer Arbeitsgruppe zu den folgenden Themenbereichen:

- Webseite / Email-Server / Social Media
- Aŭskulta Servo
- Nachwuchsarbeit, JES
- KEKSO, Lehre/KEK, Projekte
- Zusammenarbeit mit DEB Zielgruppe ab 28
- komitatanoj / TEJO

La KKPS de Klara

Ĉi-jare mi partoprenis la KKPS-n (Klaĉ-Kunvenon Post-Someran) por la 4-a fojo, se mi bone memoras. Ĝi estas semajnfina renkontiĝo, kiun NEJ (la Nederlanda Esperanto-Junularo) organizas ĉiujare dum Haloveno.

Gi altiras ĉefe, sed ne nur, junulojn, kaj ne nur nederlandajn, sed ankaŭ belgajn, germanajn kaj pli forajn Esperantistojn. Ĝi havas varman etoson, pro tio ke la vintro alproksimiĝas kaj multaj de la partoprenantoj jam konas unu la alian. Ĉi-jare ĝi okazis en Hunsel, vilaĝo proksime de Weert, en Limburgo, la plej suda regiono de la lando.

Tradicie KKPS estas renkontiĝo de klaĉoj kaj ludoj, kvankam la ĉeesto de ambaŭ dependas ĉefe de tio, kion oni mem emas fari kiel partoprenanto. Kelkajn klaĉojn oni tamen povas jam legi en la Pos-Amiko, la revuo de NEJ kaj plej amuza revuo de Esperantujo.

Aliaj tradicioj estas la Halovena balo, ekskurso, la jarkunveno de NEJ, kaj nuntempe ankaŭ TEJO-trejnadoj. Ĉi-jare estis anglalingva trejnado pri rajtbaziteco, kun trejnisto de Forumo Junulara Eŭropa. Mi bedaŭrinde ne partoprenis ĝin, sed mi vidis ke ĝi estis entuziasme sekvata. Dum la NEJ-kunveno, ni voĉdonis pri statutŝanĝoj, kutimaj dokumentoj, elektis novan Estraron, kaj decidis ke NEJ kandidatiĝos por IJK 2020 se ne venas taŭgaj kandidatiĝoj el Ameriko.

Ni havis tre plaĉan ekskurson al interesa loka muzeo: la muzeo de strangaj tepotoj! Tie ni ĉiuj malkovris ke tiu ĉiutaga objekto fakte estas fonto de senlima arta inspiriĝo. Dum la Halovena balo, ni ŝminkis kaj strange vestis nin, kaj voĉdonis por la plej bela (Alina), plej timiga (Jonny M) kaj plej originala (Roĉjo, Agata, Niko, Nika) kostumo. Krom tio estis multaj interesaj programeroj, kiel vespera kunkant-koncerto (Spenĉjo), desegnokurso (Alina), kaj prelegoj pri interalie la historio de la periodika sistemo (Frank), rifuĝintoj al Eŭropo (mi) aŭ spirproblemoj dum dormado (Miko).

Lastjare multaj homoj plendis ke la ejo estis malkomforta, ĉar estis nur unu ejo kie pluraj programeroj okazis samtempe,



kaj ne estis taŭga hejtado. Feliĉe ĉi-jare NEJ povis oferti lokon samtempe malmultkosta kaj komforta, kun hejtado kaj pluraj ejoj – eĉ apartaj dormejoj por festemuloj kaj dormemuloj. Bonege!! Estis ankaŭ laŭdoj por la manĝo, kiu estis kaj tagmeze kaj vespere varma, kaj vere bongusta. Kiel kutime, veganaj kaj vegetaranoj ne bezonis havi zorgojn. Dum la balo vendiĝis tre diversaj varmaj manĝetoj kaj bongustaj t/ drinkaĵoj. Komprenoble, ĉiu renkontiĝo ricevas kaj laŭdojn kaj mallaŭdojn. Ĉi-jare mi aŭdis plendojn ke la renkontiĝo ne estis sufiĉe bonveniga por komencantoj. Estus bona ideo enkonduki anĝelan servon dum KKPS kaj doni pli da atento al komencantoj dum la interkona vespero.

Mi esperas ĝui denove bonegan etoson en la sekvontjara KKPS, kaj tie renkonti vin, karan leganton! **Klára Ertl**

Der Hahn auf Geisterjagd

Das diesjährige Klaĉ-Kunveno Post-Somera fand in dem niederländischen Ort Hunsel statt, nur wenige Kilometer von Roermond entfernt. Ich freute mich darauf, viele Freunde wiederzusehen, mit denen ich den Sommer in Spanien auf dem IJK verbracht hatte.

Durch die kalten Nächte und akute Werwolf-Warnungen in den eigenen Reihen mussten wir zusammenrücken. Beim Buffet und der Bierauswahl konnte ich mich aber nicht beklagen. Am zweiten Tag (Samstag) machten wir einen Ausflug zum nahegelegenen Teekannenmuseum. Dort gab es über zweitausend kuriose, schöne oder seltene Teekannen. Abends gab es den Halloween-Ball, an dem die besten Kostüme in drei Kategorien ausgezeichnet wurden. Den ersten Preis für das schönste Kostüm gewann Alina mit einem Charakter aus einer mir nicht bekannten Serie, das originellste Kostüm konnten eindeutig die Organisatoren als Ghost Busters für sich gewinnen. Das erschreckendste Kostüm hingegen bekam, trotz harter Konkurrenz durch einen als Trump gekleideten Kevin meine Verkleidung als Ringgeist aus Herr der Ringe. Leider konnte der namensgebende Hahn „Poso“ dieses Jahr wieder nicht erscheinen – Er musste wohl über das Wochenende bei der Geisterjagd helfen..

Mein größter Kritikpunkt kann also nur ein zu schnell vorübergehendes Wochenende sein. Immerhin gab es eine kleine Dosis Esperantujo, die hoffentlich bis zum nächsten JES ausreicht. **Jonas Marx**





Infos zum JES:

Die Website gibt es jetzt auch auf Deutsch, also schaut doch mal rein: <http://jes.pej.pl/de/>

Es gibt schon viele Beschreibungen zu geplanten Programmpunkten. Außerdem seid ihr alle ganz herzlich zur Mitgliederversammlung eingeladen.

Warum Mitglied der DEJ werden?

Ihr habt Freunde, die Esperanto sprechen, aber noch nie von der DEJ gehört haben, oder sich nicht sicher sind, was ihnen eine Mitgliedschaft bei uns für Vorteile bietet, dann schaut mal auf Facebook oder Instagram rein und informiert euch.

Jonny M

Wir sind jetzt auch auf LinkedIn zu finden:

www.linkedin.com/company/dej/



28-a de decembro 2018 ĝis 4-a de januaro 2019
Junulara E-Semajno en Hirschluch in Storkow



Organizas ĝin GEJ kaj PEJ kaj ni kore invitas vin festi en la novan jaron kun ni. Krome okazos la membrosembleo de GEJ kun planado de la nova jaro kaj elekto de nova estraro. Do se vi interesiĝas pri nia agado aŭ eĉ pri iĝi estrarano ne hezitu kontakti nin.

Expolingua in Berlin

16./17.11.18

Bei einem Treffen mit Esperantofreunden in Berlin wurde ich auf die Expolingua aufmerksam gemacht und suchte sogleich tatkräftige Unterstützung, damit wir den Vertretern des DEB bei der Betreuung ihres Standes bei dieser Sprachenmesse unter die Arme greifen können und damit die Besucher sehen, dass auch junge Menschen Esperanto sprechen. Um eins vorwegzunehmen: Diesen Eindruck konnte man am Ido-Stand leider nicht gewinnen.

Ich fand also Verbündete und machte mich am Freitag Nachmittag mit Jonas und Chuantong, oder wie wir ihn nennen, Wang, auf den Weg nach Berlin. Für Wang war es nach dem KEKSO in Heidelberg, zu dem er seinen Mitbewohner Jonas zum ersten Mal begleitete, das zweite Esperanto-Event.

Am Russischen Haus trafen wir auf unsere Gastgeber, Ulrich und Barbara Brandenburg, die schon auf uns warteten und uns nach dem Ende des ersten Messetages bei sich zu Hause mit Pizza, Salat und Käsespezialitäten verwöhnten. Wir saßen noch lange zusammen am Tisch und redeten, bis uns die Aussichten auf ein frühes Frühstück in die Federn trieben.

Am nächsten Morgen standen wir motiviert in den Startlöchern, um ganz viele Leute über Esperanto zu informieren. Mit unseren neuen Flyern und Visitenkarten waren wir auch bestens dafür gerüstet und als um 10 Uhr die Messe eröffnet wurde, gingen wir es an und wir erlebten den Tag alle sehr unterschiedlich:

Jonas beschreibt den Tag insgesamt als eine schöne und interessante Erfahrung. Neben vielen Gesprächen mit interessierten Besuchern erkundete er sowohl die Stände zur russischen Sprache, als auch die russische Bar des Hauses. Passend zu seinem Studiengang Slawistik fühlte er sich im Russischen Haus sehr wohl.

Für Wang blieb auch etwas Zeit, sich in der Umgebung der Friedrichstraße umzusehen. Er findet Berlin schön, und kommt gern wieder, um mehr zu sehen. Die vielen



Sprachen, die präsentiert wurden und die vielen Fragen, die zu Esperanto gestellt wurden, zeigten ihm, dass er sich auch weiterhin damit beschäftigen möchte. Das Sammeln von Adressen von Interessenten und andererseits das Verteilen von kleinen Werbegeschenken haben ihm Spaß gemacht und er hat auch andere Angebote der Messe genutzt, so wie einen Minisprachkurs und die Tandembörse.

Ich für meinen Teil habe, wenn ich mal kurz nicht an unserem Stand war, mal beim Ido-Stand vorbeigeschaut und mich über die Unterschiede zu Esperanto aufklären lassen, mich mit Chuck Smith zu einem Kaffè getroffen und mich nach lustigen Werbegeschenken umgesehen. Am coolsten waren da noch unsere Nachbarstände. Ihre hungrigen Betreuer kamen immer mal wieder auf einen Keks oder einen Gummibären zu uns über.

Der Abend kam schneller als gedacht und es wurde Zeit, den Stand abzubauen. Wir fuhren erneut zu unseren Gastgeberinnen und aßen leckere Hotdogs und Kartoffelsalat. Der restliche Abend verlief ähnlich wie der vorige und wir fielen müde in unsere Betten.

Den Sonntag nutzen wir für einen Besuch des Deutschen Historischen Museums Berlin, das sehr zu empfehlen ist.

Ein schöner Abschluss des Wochenendes war, als mir Wang beim Abschied noch ein ausgefülltes Mitgliedsformular in die Hand drückte und sich somit bis zum JES bei mir verabschiedete.

Zum Schluss bleibt mir nur, einen Dank auszusprechen, an Ulrich und Barbara, die uns fürstlich bewirteten und das Wochenende zu einem unvergesslichen machten. Und an Wang und Jonas, mit denen es sehr lustig war. Bis bald!

Eure Michaela

Informationen des Bundesvorstands

1. Erhöhung der Abonnementpreise

Wegen gestiegener Kosten müssen die Preise für die Abonnements von ‚Esperanto aktuell‘ erhöht werden. Ab der 1. Ausgabe 2019 erhöht sich der Preis um 1 € pro Jahr. Inländische Bezieher zahlen dann für das Jahresabo 19 €, ausländische Bezieher 25 €. Mitglieder sind von der Erhöhung nicht betroffen.

2. Nachweis der Spende / Zuwendungsbescheinigung

Mitgliedsbeiträge und Spenden eines Kalenderjahres an den Deutschen Esperanto-Bund e. V. können Sie bei Ihrer Einkommensteuererklärung als Sonderausgabe geltend machen:

- Falls Ihre Beiträge und Spenden **200 € übersteigen**, sendet Ihnen der D.E.B. im Folgejahre unaufgefordert eine Zuwendungsbescheinigung zu.
- Falls Ihre Beiträge und Spenden **200 € nicht übersteigen**, benötigen Sie keine Zuwendungsbescheinigung. Als Nachweis genügt alternativ 1. der Bareinzahlungsbeleg mit dem Vermerk der Bank „Zahlung erfolgt“ oder 2. der von der Bank quittierte Überweisungsbeleg oder 3. ein Ausdruck des Homebanking. Folgende Angaben müssen auf diesem Beleg erscheinen: Name und Kontonummer des Auftraggebers, Name und Kontonummer des D.E.B., Betrag mit Buchungstag und in der Betreffzeile der Vermerk „Spende“ oder „Mitgliedsbeitrag“. Verwenden Sie sicherheitshalber die deutschen Bezeichnungen. Zusätzlich müssen Sie eine Kopie der nachfolgenden Bescheinigung über die Gemeinnützigkeit des D.E.B. dem Beleg beifügen:

Bescheinigung über Gemeinnützigkeit

Der Deutsche Esperanto-Bund e. V. ist wegen der Förderung des Völkerverständigungsgedankens und der Förderung von Wissenschaft und Forschung nach dem letzten uns zugestellten Freistellungsbescheid des Finanzamtes für Körperschaften I, Berlin vom 19.7.2017, Steuernummer: 27/663/59791 nach § 5 Abs. 1 Nr. 9 des Körperschaftsteuergesetzes von der Körperschaftsteuer und nach § 3 Nr. 6 des Gewerbesteuergesetzes von der Gewerbesteuer befreit, weil er ausschließlich und unmittelbar steuerbegünstigten gemeinnützigen Zwecken im Sinne der §§ 51 ff. AO dient.

- Falls Ihre Beiträge und Spenden 200 € nicht übersteigen, Sie aber trotzdem einmalig oder auf Dauer eine Zuwendungsbescheinigung haben wollen, teilen Sie dies bitte der Geschäftsstelle oder dem Schatzmeister mit.

Dr. Matthias Hecking, Schatzmeister

Prof. Ilona Koutny ricevis la 16-an FAME-premion



Toten-Gedenken der FAME-Stiftung

Dass die Stiftung nun auf schon 30 Jahre erfolgreicher Tätigkeit zurückblicken kann, wurde bereits anfangs berichtet. Als einer der Zustifter und Freund der Familie des Stifters ist es mir jedoch ein Anliegen, dass man ihrer gedenkt:

Bereits vor 25 Jahren, war am 9. April 1993 Franz Alois Meiners von uns gegangen und hatte uns eine florierende Stiftung hinterlassen. Ende letzten Jahres, am 9. Dezember 2017, verstarb auch seine Witwe Heidi, die selber nicht Esperanto sprach, aber der Stiftung immer sehr verbunden geblieben war.

In Dankbarkeit halten wir kurz inne und gedenken ihrer: Möge ihr Vermächtnis auch uns überdauern und diese Verse Eichendorffs auf immer sie begleiten:

*und meine Seele spannte
weit ihre Flügel aus
flog durch die stillen Lande
als flöge sie nach Haus
kaj la flugilojn siajn
etendis la animo mia
landojn traflugis, la trankvilajn
kvazaŭ al hejma celo sia*



Prof. Ilona Koutny kun siaj disĉiploj: Andreas Emmerich, Horst Vogt, Bernhard Westerhoff, Katalin Kováts kaj Petro Zilvar